# Miguel Díaz-Canel: Alvoko al la amaskomunikiloj

La unua vicprezidento Miguel Díaz-Canel, kunvokis  ĉi-lunde al la amaskomunikiloj de la insulo, konstrui  sian komunikan strategion kaj koincidigi la publikan kaj median agendojn.

Dum la asembleo jara de la faka delegitaro de la gazetaro, de la kuba unuiĝo de ĵurnalistoj (UPEC), Díaz-Canel  elstarigis ke tiu sektoro gajnis plian aŭtoritaton kaj agnoskon, kaj samtempe emfazis la gravecon de la kulturo de debato kaj konstanta dialogo celanta serĉi solvojn aŭ respondojn fronte al la problemoj.

Li memorigis ke en la kompleksa internacia scenejo, kun restariga platformo kapitalista kaj novliberala, kiu en Latinameriko subfosis progresistajn registarojn, la amaskomunikiloj imperiismaj havis ĉefan rolon, agadis kiel politikaj partioj kaj defendas interesojn kiel povocentroj.